

Ni aŭskultu Denis de Rougemont
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 760, 1978.05.04 & 06

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Verkoj, kiuj filozofie bone respegulas la momentajn priokupojn de la homoj, subite altiras la atenton kaj konsenton de vasta legantaro. Tiel tre verŝajne nun okazas en franclingva Svislando kaj eĉ en Francio mem kun la libro de la svisa kaj eŭropa verkisto **Denis de Rougemont** : *L'Avenir est notre affaire* (Estonteco estas nia afero).

A.- Tiu ĉi libro ne nur detalege priskribas la hodiaŭan industrian krizon, sed ĝi klare demonstras, ke la homoj troviĝas antaŭ decidiga elekto, elekto ĉu resti fidela al vivsinteno kiu karakterizis la neolitikon, kaj pere de ĝia ruiniĝo, ĉu konscie eniri la elektronan eraon. Neolitiko ligis la homojn al limigitaj kaj sanktigitaj teritorioj ; elektroniko igas la homojn sendependaj de la teritoriaj ligoj.

Cl.- Dum prelegaro ni donos la parolon al *Denis de Rougemont*, esperantigante citaĵojn el lia libro *L'Avenir est notre affaire* (Estonteco estas nia afero). Ni tuj sciigas al nia aŭdantaro, ke ni volonte sendos la tekston de tiu ĉi prelegaro al ĉiuj, kiuj ĝin petos skribi al la kurtunda servo de nia Svisa Radio. Ni hodiaŭ traduke citos al vi erojn el la *Enkonduko* de la libro *Estonteco estas nia afero* :

A.- Denis de Rougemont atentigas nin, ke « unuafoje en Historio la homo vidiĝas malvole devigata libere elekti sian estontecon kaj tiun de la propra specio. [La homo] vidiĝas malvole devigata al tio pro la nura fakto, ke unuafoje li akiris la liberon elekti, do la koncernan responsecon.

Cl.- [La homo] malvole vidiĝas devigata elekti, ĉar ne elekti estus forlasi sin al la ordonoj de la ruinego, kies mekanismojn la industria Okcidento estas nuntempe aranĝanta. [La homo] vidiĝas devigata elekti en libereco, tio estas senhezite, post atentega pripensado, kun juĝkonscio pri la kaŭzoj kaj ĉefe pri la dezirataj celoj. [...] » (p. 7.)

A.- « Se ni ne libere elektos nian estontecon, ne estos plu homa estonteco transe de neevitebla kataklismo, kiun la maloftaj postvivantoj ne rakontos pro manko de publiko : finiĝos la rakontado pri civilizoj, finiĝos Historio.

Cl.- Se ni taŭge elektos nome de celadoj ne plu nure materiaj, sed unue korinklinaj kaj spiritaj, estos nova naskiĝo, nova estonteco, kiu povos malfermiĝi por la persono en novaj komunumoj : komenco de la historio de la veraj deziroj de la homo en ĉiuj dimensioj de lia realeco – de lia fariĝo ! » (p. 7-8.)

A.- Denis de Rougemont konkludas dirante : « Ĉio estas ankoraŭ ebla kaj eĉ pli ol iam antaŭe. Ĉio eblas, sed elekto estas necesa. » (p. 8.)

Cl.- Poste Denis de Rougemont priskribas la krizon, kiun ni vivas konservante la esperon, ke ĝi kondukos la homaron al la formulado de nova politiko. Ni daŭrigas la eltradukadon de la plej signifaj tekstoj :

A.- «...se ĝis antaŭnelonge [por la homoj] temis ĉefe pri postvivado al naturaj kontraŭ-homaj minacoj, de nun temas pri postvivado al minacoj. kiujn nia industrio trudas al la tuta

Naturo.... » (p. 9.) « De nun » konkrete signifas : « de la mezo de la 20-a jarcento. » De tiam videbliĝas la du konverĝaj fenomenoj, kiujn priskribos la unua parto de lia libro en la ĉapitraro titolita Kriz-sistemo : Temas « pri la malnobliĝo de la interhomaj rilatoj en la urbegoj, kaj pri la teknikista agreso al la tuta Naturo minerala, vegetala, animala kaj homa. Agreso subita, speco de frenezaĵo, kies plej sentebaj signoj estas la buldoza frakaso, la beton-tajdo sur la kamparon, la akumulo de DDT aŭ hidrargo en la homa organismo, la poluo de la akvoj subteraj kaj riveraj, la venenigo de la oceanoj, kaj la keo de elementoj, kiujn Naturo nekonis ĝis tiam, kiel plutonio, kies nomo mem ... anoncas la inferan naturon. » (p. 9.)

Cl.- Denis de Rougemont opinias, ke « ni alvenas je la fino de la neolitika erao, kiu vidis fiksadon de nomadoj sur la grundo, naskiĝon de patrioj kaj de civitoj fare de kuniĝo de riĉofontoj, kutimoj kaj leĝoj meze de teritorio limigita kaj sanktigita. ... (p. 9-10.)

A.- ... jen ni staras ĉe la sojlo de la elektrona erao : de tiu de la homaj interrilatoj sendependiĝintaj de la ligoj kun la grundo kaj kun la teritoriaj difinoj. » (p. 10.)

Cl.- Por Denis de Rougemont « la hodiaŭa sukceso mem de la civiliza streĉo de Okcidento devigas nin elekti nian estontecon kaj formuli kaj voli politikon, kies celo estas la homo kaj la homaro. » (p. 10.)

A.- « La kriz-stato, kie eniris la nuntempa homaro, estas tutmonda. Tio signifas, ke ĉiu loka krizo venigas aliajn, kiuj tendencaj pligravigi la situacion, tiele ke kriz-sistemo stariĝas. En ĝi ĉiu perturba faktoro nutras aron da aliaj. ... Ilia ensorĉita cirklo etendiĝas al la dimensioj mem de la Tero. » (p. 10.)

Cl.- Konklude al siaj enkondukaj vortoj *Denis de Rougemont* sciigas, ke la unuan parton de sia libro *Estonteco estas nia afero* li dediĉos al la registrado de la ĉefaj krizfaktoroj propraj al la hodiaŭa mondo. En tiu ĉi ĉapitraro titolita *Kriz-sistemo* li fakte sentigas « la urĝon de politiko, tio estas de interven-programo celanta strategiajn punktojn de la sistemo. » Kaj li demonstras la eblon de tiu ĉi politiko. (p. 11.)

A.- La venontan semajnon ni prezentos al vi, kion Denis de Rougemont nomas en la franca lingvo « La religion de la croissance » Traduko : La kresko-religio.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!